

Laborplano de TEJO-Estrararo

2012/2013



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Surbaze de kontribuoj de TEJO-estraranoj
kompilis Łukasz Żebrowski
Prezidanto de TEJO

30/07/2012

1. Enkonduko

Antaŭvorto

Pasis jam duona oficperiodo de la nuna estraro. Pri tio, kio realiĝis dum la lasta jaro oni povas legi en la Jarraporto 2011/2012. En ĉi tiu dokumento ni prezentas al Vi planojn por la venonta. Evidente ĝi estas signife pli detala ol nia unua laborplano. Evoluiginte niajn ideojn en diversaj kampoj, nun ni prezentas ĉion kun laŭeble konkretaj celoj, mezureblaj efikoj kaj difinitaj limdatoj. Ni bonvenigas Vin konatiĝi kun ĉi tiu dokumento kaj aparte esperas je pozitivaj reagoj pri Via helpo realigi iujn erojn de la laborplano.

Konsisto de la estraro

Ĉar okazis dume du ŝanĝoj en la estraro, jen ni prezentas al Vi la teamon kun kiu ni eniras la jaron 2012/2013:

Łukasz Żebrowski – Prezidanto, kunordigo, homaj rimedoj
Paweł Fischer-Kotowski – aganta Ĝenerala Sekretario
Sergey-Meiyer Tyirin – unua Vicprezidanto, informado
Michael Boris Mandirola – dua Vicprezidanto, eksteraj rilatoj
Nico Huurman – tria Vicprezidanto, Kasisto, financoj, subvencipetado
Tina Tišljar – Estrarano, kongresoj
Petra Smidéliusz – Estrarano, landa agado, edukado

Amendoj al la laborplano

Komitato de TEJO kunveninta en IJK 2012 en Hanojo faris kelkajn amendojn al la laborplano. Tiuj aldonoj estas skribitaj *kursive*.

2. Kunordigo kaj homaj rimedoj

Estrara sistemo por superrigardi plenumadon de taskoj

Esplori kaj elprovi haveblajn sistemojn por superrigardi plenumadon de taskoj ĝis fino de septembro. Instaligi kaj funkciigi elektitan sistemon ĝis fino de oktobro.

Komisionoj

Kolekti aliĝojn al komisionoj ĝis fino de aŭgusto (devige de ĉiuj komitatanoj, sed ankaŭ de aliaj homoj, kiuj ŝatus kunlabori). Funkciigi novajn komisionojn kaj refunkciigi la dormantajn en septembro.

Aktivula datumbazo

Funkciigi la datumbazon ĝis fino de somero. Oktobre kampanji por enskribiĝoj al la datumbazo.

Kunlaboranontoj

Ĝis fino de aŭgusto dissendi al niaj kernaj aktivuloj demandojn pri dezirataj kunlaborantoj, helpantoj, kontribuantoj, ktp. Kolekti la unuajn respondojn ĝis fino de septembro. Sekve ripeti regule, minimume ĉiujn 2 monatojn.

Homaj rimedoj ĉe tejo.org

En oktobro rearanĝi kaj pliampleksigi parton en tejo.org dediĉitan al homaj rimedoj. Ĝi konsistos el kolektitaj kunlaboranontoj kaj formularo por enskribiĝi al aktivula datumbazo. Kontroli efikecon de ambaŭ iloj ĉiun trian monaton (t.e. januare, aprile kaj julie 2013) kaj prepari ties analizon por la jarraporto 2013.

3. Kulturo

Artista datumbazo

Dum somero 2012 varbi pri la relanĉota projekto. Ĝis fino de septembro havi funkciantan datumbazon kaj paĝaron. Aŭtune denove varbi jam por reta aliĝado kaj aligado.

Fotokonkurso en Kontakto

Okazigi fotokonkurson en Kontakto en 2013, kadre de ĝia 50-jariĝo (detalaj datoj decidotaj de la redaktoro).

Muzika konkurso anstataŭanta kanto-branĉon de Belartaj Konkursoj de UEA

Ĝis fino de oktobro havi kompletan projekton de la konkurso, inkluzive de ĝia regularo ktp. Sekve fintrakti kun UEA la detalojn. Okazigi la konkurson tiel ke disdono de premioj okazu somere 2013, kun la premioj kadre de Belartaj Konkursoj. *La juĝantaro ne estu en financaj rilatoj kun la konkursanoj. Kaze ke temu pri fizika aranĝo kaj iu konkursanoj ne povas ĉeesti la aranĝon ties artaĝoj estu konsiderita.*

4. Financoj

Raporto kaj budĝeto

Krei finanĉan raporton pri la unua duono de 2012 kaj budĝeton por la dua duono, ĝis fino de aŭgusto.

Repagoj

Krei ordon en la repagoj de FoJE-eventoj kun kontistoj de Centra Oficejo, ĝis fino de septembro.

Aŭtomatigo de financa raporto

Krei kalkultabelon por facile konverti la konteltirojn de la TEJO-kontoj en finanĉan raporton, ĝis fino de 2012.

Manlibro pri financoj

Finverki la manlibron pri financoj, ĝis fino de 2012.

5. Informado

Informado far la Estraro

Necesas zorgi ke la establitaj komunikiloj plu efektive funkcii. Devas esti pliatentita la interkonsentita sendado de komunikiloj pri retaj estraraj kunsidoj al la komitato, precipe kiam okazos la ŝanĝiĝo de la volontulo.

TT-blogo

Ĝi ne sufiĉe viglas lastatempe. Ĝis fino de somero necesas pridiskuti tion kun Szabi kaj trovi solvon.

TT ĉe Muzaiko

Ankaŭ tiu ĉi iama iniciato de Dan ne pluvivis kaj same ĝin ni opinias inda. Por ambaŭ taŭgas la solvo de TT-redakta teamo.

Limdatoj: dum IJK diskuto; cele havi jam en septembro klaran ideon pri pluaktivigo de kaj blogo kaj voĉa TT.

Plibonigoj de TA

Enhavaj plibonigoj jam estas efektivigataj. Dum dua duono de 2012: solvi la teknikajn problemojn kiuj malfaciligas la grafikan refreŝigon kaj aliajn malantaŭ-kulisajn ĝisdatigojn.

Unustila informilo tradukebla al naciaj lingvoj

En septembro ni havu havi la uzeblajn materialojn por kompili el ili la informilon. Samtempe komenci pretigi la grafikan aspektigon. Celdato por disponigo al LS-j: fino de oktobro.

Renovigo de tejo.org:

Dum IJK kaj laŭeble en aliaj someraj aranĝoj estu serĉataj tradukistoj por la retejo. La kreado de enhavo-diagramo kaj ĝisdatigoj de la enhavo estu kompletigitaj en septembro-oktobro. (Dume pliaj tradukemuloj serĉindas.) En novembro komenci la laboron de rearanĝo kaj samtempe la tradukadon. *Samtempe estu prezentita GANTT-diagramo pri la diversaj taskoj kaj antaŭvida plenumtempo.*

Manlibro pri redaktado en tejo.org:

Ĝi estu kompletigita en septembro.

Dialog':

Okazis diskuto en majo, sed ĝi ne estis sufiĉa. Dum IJK estu laborgrupo por komune pripensi la detalojn. Se la planoj estos kontentigaj, ekprepari la teknikan bazon (vikio/tradukaj iloj) kaj lanĉi en aŭtuno aŭ vintro 2012.

Mojosaj akcesoraĵoj:

Kvankam pli atento-kaptiloj ol vere utilaĵoj, estus bele havi iujn por la onta novjaro, ankaŭ tejo-kalendaretoj kiuj jam de pluraj jaroj ne aperas. Proponatas cerboŝtormo dum la venonta estrara kunsido en CO.

6. Eksteraj rilatoj

FoJE – Forumo Junulara Eŭropa

Daŭrigi nian ĉeeston en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa) kaj laŭeble plifortigi kaj pliefikigi ĝin per partopreno en eventoj, lobiado kaj elektigoj.

- Elektigi almenaŭ du niajn homojn al labostrukturoj de FOJE (2012-2013) (aprilo).
- Partopreni en almenaŭ 7 renkontiĝoj krom la statutaj dum la estrarjaro 2012/2013.

Aliaj kontinentaj platformoj

Trovi respondeculon ene de TEJO por almenaŭ 3 kontinentaj platformoj, kaj kandidatiĝi TEJOn laŭeble.

UNESKO

Partopreni en kunvenoj de UNESKO klopodante igi TEJOn konata tiukadre – ĉeeste en almenaŭ 2 internaciajn junularajn UNESKO-eventoj (unu ĝis januaro).

Projektoj kun aliaj organizoj

Realigi komunajn projektojn kun aliaj organizoj kiel seminariojn pri komunaj interesoj aŭ aktivulan trejnadon.

- Realigi lingvopolitikan seminarion kun AEGEE.
- Eltrovi kunlaboreblon kun aliaj du organizoj.

Detaloj pri ambaŭ ĉe 7. Aktivula trejnado kaj seminarioj.

ICMYO – Internacia Kunordiga Kunsido de Junularaj Organizoj

Plureaktiviĝi kadre de ICMYO – partopreno en ICMYO-kunveno (septembro).

7. Aktivula trejnado kaj seminarioj

Strategio pri aktivula trejnado

Krei strategion pri tio kiajn aktivulojn kaj kiujn kompetentojn bezonas TEJO kaj ĝiaj sekcioj; limdato: preta ĝis fino de aŭgusto.

Aktivula datumbazo

Pere de aktivula datumbazo trovi trejnantojn inter niaj aktivuloj; limdato: ĝis fino de novembro havi en la datumbazo plejparton de kerna TEJO-aktivularo, sekve daŭrigi serĉadon kaj regule aldoni pliajn.

Trejnseminario kun AEGEE

Realigi komunan trejnseminaron en kiuj membroj de TEJO kaj alia(j) organizo(j) povas kune trejniĝi kaj dume lerni unuj de la aliaj; limdato: havi rezulton de esploro kun AEGEE ĝis fino de somero 2012, realigi printempe 2013.

Trejnseminario pri lingvopolitiko en Eŭropa integriĝo

Organizi seminarion kun alia(j) junulara(j) organizo(j) kiuj favoras al Eŭropa integriĝo por preparoli kun ili la lingvopolitikan flankon de tiu procedo; limdato: nova subvencipeto kaj aliaj monpetoj ĝis fino de septembro, realigo de la seminario meze de 2013, depende de la subvencioj.

Dum tiu seminario krei komune interkonsentitan skizon de efika kaj justa eŭropa lingvopolitiko kaj laŭeble ĝin disvastigi al pli larĝa publiko; limdato: unu monaton post la seminario.

Retaj aktivulaj trejnadoj

Esplori la eblecojn por efektivigo de reta aktivula trejnado.

8. Kongresoj

IJK 2013

La estrarano pri kongreso se finance eblas partopreni la IJK-n.

IJK 2014

Varbi eblaj organizantojn ĝis fino de septembro. Elekti kongreslandon ĝis fino de oktobro.

IJK 2015

Lanĉi la konkurson en julio 2013.

Partopreni IJK-n 2013

Ĝis fino de la jaro 2012 pretigi pli detalan priskribon de la konkursaj kondiĉoj, kaj publikigi ilin kune kun anonco pri la konkurso komence de januaro.

Superrigardo de taskoj por evento-organizantoj

Revizii la ekzistantan materialon, finpretigi kaj publikigi ĝin ĝis fino de la jaro. *Kaze ke ĝi ne estus kompletigita oni tamen sendu la provizoran version al la ĉeforganizanto de la IJK.*

9. Landa agado

KODEJO

Perfektigi la demandojn de KODEJO ĝis decembro 2012. Publikigi la demandaron por 2012 ĝis mezo de januaro. Kolekti respondojn de LS-j ĝis fino de februaro 2013. Publikigi raporton pri KODEJO ĝis majo 2013.

Eventoj de LS-j

Krei kalendaron de junularaj eventoj ĉe tejo.org ĝis novembro 2012. Regule reklami eventojn kiujn la LS-oj organizas (en la kalendaro kaj per reklamoj en tejo.org, TA, TT, Facebook-paĝo ktp.).

Materialoj por LS-j

Krei eron en la retejo pri varbado, flugfolioj, prezentadoj ktp. tradukredakteblaj por la LS-j ĝis fino de februaro.

Novaj LS-j

Ekhavi almenaŭ unu novan landan sekcion. Ĝis fino de 2012 fari esploron pri eventualaj kandidataj organizoj, samtempe tenante kontakton kun tiuj jam aperintaj novaj junularaj asocioj (Junularo Esperantista Pakistana kaj Ĉilia Esperantista Junulara Organizo). Sekve labori kun ili pri kandidatiĝo kaj prezenti ĝin al la Komitato antaŭ IJK 2013.

Reaktivigo de LS-j

Teni kontakton kun almenaŭ kvar nun dormantaj landaj sekcioj pere de la landaj asocioj de UEA.

10. Edukado

Subvencioj por KER-ekzamenoj

Regule reklami pri subvencio por TEJO-membroj por la KER-ekzamenoj: ĝeneralaj komunikoj ĉiun trian monaton kaj celkomunikoj okaze de signifaj KER-sesioj.

Subvencioj por RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe edukado.net)

Regule reklami pri subvencio por TEJO-membroj por la RITE: ĝeneralaj komunikoj ĉiun trian monaton.

Subvencioj por instruista trejnado

Subteni partoprenon de junuloj en kursoj pri instruista trejnado.

Kunlaboro kun ILEI

Esplori la eblecon kunlabori kun ILEI kaj laŭleble efektivigi ĝin.